

## Tagordo por la Komitato de ILEI en Kunmingo

Unua livero: 4an de julio, 2012:

Nuna livero: 12an de julio, 2012. Sama enhavo, alia tempo-divido.



La sekvo estas la propono de la Estraro.

Ni memorigas vin, ke Komitatkunsidoj estas publikaj. Nur komitatanoj kaj anstataŭantoj rajtas voĉdoni; nekomitatanoj havas parolrajton nur se la komitato tiel decidas.

### Sesio 1: (en sabato la 21an de julio, de 11.00 ĝis 12.30 en salono Szerdahelyi)

1. Bonvenigo
2. Decido pri la kvorumo.
3. Definitivigo de la tagordo.
4. Elekto de protokolanto.
5. Akcepto de la protokoloj el Kopenhago (rete akceptitaj - videblaj en la retejo)
6. Resumo kaj konfirmo de komitataj retdecidoj de post aprilo 2011..
7. Komentoj pri la sperto de reta voĉdonado post dujara praktikado.
8. Starigo de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.
9. Proponoj por Honoraj Membroj (dissenditaj, videblaj reteje)
10. Modifoj por la Interna Regularo.
11. Trakto de eventuale venintaj aliĝpetoj de sekcioj.
12. La sinteno de ILEI al la Strategia Vizio nun sub diskuto en UEA (v. IPR 2012/2)

### Sesio 2: (en lundo la 23an de julio – de 09.00 – 12.30 en salono Szerdahelyi)

13. Ceteraj diskutendaj punktoj kun la forironta estraro.
  - 13.1 Akcepto de la konsisto de la Internacia Ekzamena Komisiono (IEK)
  - 13.2 Koncepto por instruista trejnado (dokumento dissendita)
  - 13.3 Buĝetmodifa propono por UEA.
  - 13.4 Aliaj punktoj
14. Prezento kaj diskuto de la Jarraporto 2011 (inkluzive de la financa rezulto, la raportoj de la Landaj Sekcioj (en la retejo) kaj la membrostatistikoj)
15. Voĉdono pri la financa raporto pri 2011.
16. Voĉdono pri la jarraporto pri 2011 kaj senŝarĝigo de la estraro.
17. Memorigo pri la proceduro por estraraj elektoj.

*Por la sekvaj sub-punktoj gvidas la prezidanto de la Elektro-Komisiono (EK).*

1. Raporto pri la laboroj de la elektokomisiono tra lastaj monatoj.
  2. Decido pri la nombro de estraranoj. (vidu la statuton, 7.2.2)
  3. Elekto de la prezidanto. (vidu Statuton, punkto 7.1.6)
  4. Elekto de la sekretario;
  5. Elekto de la kasisto (same)
  6. Voĉdonado pri kandidatoj jam servintaj tra du mandatoj. (vidu 7.1.6 en la Interna Regularo)
  7. Elekto de la ceteraj estraranoj.
18. Opinioj de komitatanoj pri gravaj taskoj kaj strategioj por la nova periodo.

**Sesio 3:** (en ĵaŭdo la 26an de julio, de 09.00 – 10.30 en Salono Chen Yuan, kun Asemblea karaktero.)

Ĉi tio estas publika kunsido, sed ĉiu komitatano estas forte petata ĉeesti, ĉar ĉi tio estos la ĉefa okazo aŭdigi opiniojn kaj ideojn pri la sekva periodo.)

Pri la enhavo decidis la nova estraro, sed antaŭvideble:

- prezento de ege provizora taskdivido inter la novaj estraranoj
- decidoj kiel procedi se ŝlosila ofico ne havos prizorganton.
- aŭskulto de raportoj de eventualaj dumkonferencaj komisionoj.
- kiel ILEI rilatu al la Strategia Vizio kaj la naskota Strategia Plano.
- ideoj kaj proponoj por la jaroj 2012-2015.

**Sesio 4:** (en ĵaŭdo la 26an de julio, de 11.00 – 12.30 en Salono Chen Yuan)

La sesio traktos ajnajn nefinitajn punktojn el la tagordo, kaj ajnajn konkretajn proponojn el la antaŭa asembleo-stila kunsido. Se restas tempo, sekvos diskuto pri estontaj planoj, problemoj kaj defioj.



Komitata kunsido en Matanzas, antaŭ du jaroj.  
En Kunmingo estos atendeble malpli intima rondo, kaj ĉu same bonetosa?

Komitatanoj estas petataj konsulti dokumentojn elektronike, aŭ elprinti ĉiujn deziratajn dokumentojn kaj kunporti ilin, ne estas certa, ke ni povos disponigi ĉion papere surloke. La finanĉan raporton ni ja strebos disponigi papere al dezirantoj.